# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-57 sendita el Budapeŝto la 25an de decembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Senegalo pretiĝas por la 8a Afrika Kongreso

Dek estraranoj kaj membroj de Senegala Esperanto-Asocio (SEA) kuniĝis en 5-hora kunveno fine de novembro 2021 en Rufisko ĉe la domo de la prezidanto Assane Faye. Tie ili diskutis ĝisnunajn agadojn, planojn, eblojn kaj perspektivojn de SEA kaj la 8-an tutkontinentan kongreson. Ĉe la unua punkto la gravaj atingoj de la komenco de SEA en 2004 ĝis la kuranta jaro retrospektive estis prezentitaj kronologie kaj analizitaj de ĉiuj, inspircele por postaj elpaŝoj. Okazis ankaŭ memormomento al ĉiuj forpasintoj kaj aparte al Alphonse Diatta, unu el la instigintoj kaj la unua prezidanto de SEA.

Alia grava diskutita punkto estas organizo de ĉeestaj kursoj dum la lasta trimestro de la sekva jaro. Ĉiu prezentis siajn opiniojn pri tio kaj pri kiel la koncernaj kursoj estos organizitaj. Unuanima deziro estas aranĝi la kursojn por komencantoj kaj progresantoj en Rufisko kaj Dakaro respektive ĉe CENFA kaj YMCA. Planoj pri korespondado kaj kontaktado kun enlandaj publikaj kaj enmovadaj instancoj estas starigitaj por pretigi la grundon instrucele.

En la fokuso de kursoj estas ankaŭ ideo pri aranĝo de senpaga reta kurso por senegalanoj, dum kiu oni proponus iun premion por la plej bonaj lernantoj. Sed por tio necesas kunlaboro de multaj personoj. Homoj, kiuj volonte instruos kaj okupiĝos pri la administra laboro (kreo de Google-formularo; elekto de la homoj; kreo de Facebook-paĝo; kreo de la anoncoj ktp.). La Afrika Komisiono de UEA kaj Mireille Grosjean enplektiĝas kaj nun esploras kune pri la plej bona far-maniero, sed tio certe ne sufiĉos.

Personoj kun sperto pri organizado de interretaj kursoj aŭ pri gvidado de perreta instruado povas helpi. Kaze, ke pro iu aŭ aliaj kialoj iu ne povas kunlabori, sed ĉiuokaze volas helpi, tiu povas donaci al la konto Afriko ĉe UEA kun mencio 'Senegalo 22'. Per la mondonacoj ni povas evoluigi la nunajn projektojn kaj realigi ilin sukcese.

La kunvenintoj fine memorigis pri tio, ke en la urbo Thiès okazos de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) kune kun AMO-seminario de UEA. Jen oportuna okazo por sproni la entuziasmon de la partoprenintoj de la Esperanto-kurso kaj per tio hejmigi ilin en la movado. Tiuj novbakitoj povos praktiki la lingvon, spertiĝi pri la movadaj ebloj dum la kongreso.

Antoine Gomis kaj Adjévi Adjé

**Subtenu la afrikan agadon! Legu pri la progreso!**

# AMO 81 survoje en Togolando

Ekis la lasta AMO-seminario por 2021! Ni raportas pri ĝia unua tago; sekvos raporto pri la ceteraj tagoj en EKO 58.

‘La 23an de decembro komenciĝis la 81a AMO-Seminario de UEA en Togolando, ene de la Instituto Zamenhof en Lomeo. Dekkvaro da esperantistoj sekvis la seminarion en la unua tago.Je 14a horo, s-ro GBEGLO Koffi bonvenigis la partoprenantojn kaj disponigis al ĉiuj la programon de la seminario. Ĉiuj ricevis siajn lernilojn (kajerojn kaj skribilojn). 13 togolandaoj kaj unu beninano ĉeestis kaj okazis tri prelegoj.

La unua prelego estis pri la temo de la seminario : « Esperanto per Io, Io per Esperanto ». Antaŭ ol eniri la lokan programon, s-ro Attago Kokou Evienyeame, per lumbildaro, prezentis la enkondukon de s-ro Stefan MacGill (alkroĉita). Tiu ĉi menciis kion oni faras/havas nun per Esperanto, listigante ankaŭ diversajn Esperanto-agadojn tra Afriko pri Esperanto serve al pli vastaj celoj, antaŭ ol fari rekomendojn.

Venis la vico de s-ro Gbeglo Koffi (sur la dua foto) prezenti sian tekston : ‘Lernado de Esperanto per **io**, utiligi Esperanton por **Ion** fari konkrete’. Esperanto jam estas tute preta por esti utiligata en ĉiuj sferoj de la homa agado. Li ne pretervidis la fakton, ke iuj uzas la lingvon por maldecaj aferoj. Li invitas ĉiujn bone informi pri Esperanto, antaŭ ol instrui ĝin pli per rekta metodo ol per la gramatika. Poste prezentiĝis la asistanto kuracista, s-ro Kounke Yao Emileo. Li klarigis pri la malasano diabeto, menciante la simptomojn, manifestadon kaj kiel preventi ĝin. Sekvis la lasta prelego de la tago.
S-ro Edah Gadoufia Kingslim (sur la unua foto) prelegis pri ‘La limoj de la homoj’. Per vortoj trafe elektitaj, li demonstris, ke la homoj povos atingi ĉion, kion ili volas. Montriĝis, ke homoj, kiuj ne kapablas realigi tion, kion li planas, estas pigraj aŭ simple rezignas. Komprenindas, ke ĉion ajn, kion la homoj povas fari, necesas bone voli. Aplaŭdoj kronis lian prelegon kaj tiel malekis la unua tago de la seminario. La partoprenantoj revenos la postan tagon por la daŭrigo de la seminario.’

Laŭ teksto de Gbeglo Koffi.



Scenoj el la seminario



# ILEI kaj RITE subtenas instruistojn tra Afriko

“Mi kun granda ĝojo recevis la internacian diplomon kiu

agnoskas min kiel internacia instruisto de Esperanto. Mi dankas al ILEI (Mireille Grosjean) kaj RITE ĉe EDUKADO.NET (Katalina Kovats) kiuj estis niaj gvidantoj kaj instruistinoj dum du jaroj da studado.



ILEI lanĉis EIT, Esperanto Instruistan Trejnadon, en 2017. Temas pri plenjara perreta lertigado kaj plensemajna ĉeesta staĝo. En Eŭropo sukcesis tri personoj. En Afriko sukcesis du personoj: Patrick Manirakiza kaj Gilbert Ndihok-ubwayo (vidu la foton). La ĉeesta staĝo okazis komence de la jaro 2020 post la fino de la Afrika Kongreso en Buĵumburo, Burundo. La reta lertigado estis gvidata de D-ino Katalin Kovats. La ĉeesta staĝo estis gvidata de Mireille Grosjean.

Aime Patrick Manirakiza,
La Prezidanto de la landa Asocio de Esperanto en Burundo (ANEB)

## Antanarivo festis



Itaosy Esperanto-Klubo (IEK) sukcesis okazigi la festan renkontiĝon GastroPizza en Andohatapenaka sabate la 4an de decembro 2021. Ĝin ĉeestis 9 geesperantistoj. Amikino Lala rekte telefonis al ni por saluti kaj kuraĝigi nin. Tre amikeca kaj mojosa estis la etoso. Ni kantis la Esperanto-himnon, konkure ludis en Esperanto kaj manĝis bongustajn pizojn kaj sandviĉojn. Post tio, la gejunuloj aparte diskutis pri asocia vivo, ili decidis revivigi MEJA aŭ Malagasa Esperanto-Junulara Asocio. Ni ĉiuj rendevuos por la novjara renkontiĝo en 2022.

## Renoma revuo blogumas pri Esperanto

La germana gazeto taz - die tageszeitung - publikigis en sia "blogo" artikolon de mi pri la Esperanto-komunumo kaj nia lingvo, relative longa, samtempe en la germana kaj en Esperanto. Germana versio

https://blogs.taz.de/infrakulturen/gemeinsame-sprache-fu%CC%88r-menschen-aus-aller-welt/

En Esperanto: https://blogs.taz.de/infrakulturen/komuna-lingvo-por-homoj-el-la-tuta-mondo/

La artikolo aperas en serio "Infrakulturen", en kiu temas pri diversaj apartaj grupoj kaj ankaŭ pri iliaj apartaj kulturoj, lingvoj kaj lingvaĵoj.
https://blogs.taz.de/infrakulturen/

Eblas komenti la artikolon - kaj kompreneble mi tre ĝojos, se vi komentos; lingvo laŭplaĉe. Estas ankaŭ ebleco transpreni la tekston, se vi ŝatos; bv. tiam skribi al mi.

Lu WunschpRolsoven

# Kajto-koncerto por vi en Jutubo

Ĉe YouTube.com/UEAviva: https://youtu.be/_ScwseM4y2o Koncerto de Kajto: Nanne kaj Ankie. Kiu ne amas?!

## Itala kongreso pri sociaj komunikiloj

Ĉu por vi vortoj kiel Facebook, Twitter, Instagram, Telegram estas kurtenoj malantaŭ kio estas mistero ne solvebla? Aliĝu kaj partoprenu la 89an Italan Kongreson en Breŝo de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 2022. Unu el la du seminarioj pritraktos tiajn diablaĵojn, forprenante antaŭ niaj okuloj la faman kurtenon! Reĝisoros ĝin Debora Rossetti, estrarano de IEF ĝuste pri sociaj retejoj. Ne maltrafu la okazon!!!

https://kongreso.esperanto.it/89/it/

tie vi trovos tabelon de kotizoj, aliĝilon, indikojn kiel pagi kaj multon alian. Pliaj informoj kaj mapo pri Brecsia jam aperis en EKO 50.

## Orgena Vortaro el Belgio

En Belgio aperis fakpublikaĵo titolita "Orgena Vortaro" enhavanta 23 lingvojn, inter kiuj Esperanto. La vortaro estas altnivele profesia kaj ilustrita. 606 paĝojn. Kompilanto kaj redaktoro: wilfried.praet@gmail.com. Eldonis CEOS v.z.w. ISBN 9789073443006. D 2015/5456 1. Esperantlingva kunredaktoro: prof. J. W. Haazen. La libro estas valoraĵo ne nur por muzikistoj [orgenistoj] sed ankaŭ por Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj.

Jo Haazen

========= vortoj: 1185 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ilei

**Helpantoj:**
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François Lo Jacomo

**ENHAVO**

- Senegalo preparas sin
- AMO 81 – unua tago
- RITE; Madagaskaro
- Blogado pri Esperanto
- Sociaj komunikiloj